

## LA OKULTISMO REVENAS PLI FORTA OL ANTAŬE

En la papa universitato Regina Apostolorum antaŭ nelonge okazis kurso pri ekzorcismo kaj preĝo por liberigo. Celo de la seminario estis proponado de plua formacio al pastroj, kiujn la diocezaĵaj episkopoj komisiis al farado de akzorcismoj. Pri enhavo de la nunjara kurso parolis iniciatinto de tiu ĉi projekto komencita jam en la jaro 2004, profesoro Giuseppe Ferraris:

„La kurso estas en sia karaktero multdisciplina. Ĝi tuŝas multajn temojn kaj ekzorcismo estas en ĝi rigardata el diversaj vidpunktoj. Sur unu flanko estas vidpunktoj ekleziaj, teologiaj, bibliaj, liturgiaj, kateĥetikaj aŭ kanonikaj kaj sur la dua medicinaj kaj psikologiaj, juraj kaj kriminologiaj, farmakologiaj kaj pluaj. Estas proponata al la frekventantoj tre larĝa preparo.“

En nuntempa sekularigita socio ni ĉiam pli ofte aŭdas pri allogiteco de okultismo...

„La socio havis dum certa tempo tendenco la ideon pri demono forgesadi, ne paroli pri diablo, opinii lin kiel io, kio apartenas nur inter superstiĉojn. Sed dum jaroj tiu ĉi fenomeno disvastiĝis kaj nekredible elkrekis. Ĉiukaze multaj nuntempaj homoj

okupiĝas pri la demandoj ligitaj kun okultismo kaj kun satanismo. Ŝajnis, ke ĝi malaperis, sed nun ĝi revenas pli forta ol antaŭe. Novan intereson pri demono dokumentas ankaŭ reago de tiu ĉi kurso en amaskomunikiloj. Komencante per la unua kurso, ĉiuj plej gravaj medioj pri ĝi raportis. Iliaj reprezentantoj ĉi tie kolektiĝis el ĉiuj kontinentoj, kaj eĉ estis kreita filmo inspirita per tiu ĉi kurso. La filmo Rito (*The Rite 2011*) estas inspirita per romano verkita de Matte Beggli, kiu partoprenis en unu el la unuaj kursoj. Komence neniu volis paroli pri demono, nek protestanta, nek katolika teologoj. Multaj pastroj troviĝis en malfacilaĵoj, ĉar en teologiaj fakultatoj okazadis neniu seminario kaj ili ne sciis, kiel sin al tiuj ĉi problemoj alfronti. Alvenadis al ili kredantoj kun timzorgoj pri siaj parencoj, kiuj enplektiĝis en strangajn grupojn aŭ sentis sin obseditaj fare de demono kaj pastroj tute ne sciis, kion fari. De tie ankaŭ ekestis ideo de tiu ĉi kurso. Ni volas doni helpeman manon al sacerdotoj, formadi ilin, ke ili sciu, kiel en tiu ĉi kampo ĝuste moviĝi,“ diris Giuseppe Ferraris. ■

Fonto: [www.radiovaticana.cz](http://www.radiovaticana.cz)